


## La 21an de julio 2016

### Neniu prenas respondecon sur sin pri la nuklea akcidento

En la ĵurnalo Asahi de la 20a de februaro 2016 aperis intervjuo de s-ro Tarukaŭa Kazuja, 46-jara terkulturisto, loĝanta en la urbo Sukagaŭa, Fukuŝima. Tiu intervjuo estas tre kortuŝa, do hodiaŭ mi tradukos ĝin. Li apartenas al la akuzantaro, kiu postulas en la juĝejo, ke TEPCO redonu iliajn profesiojn kaj hejmurbojn. Mi trovis lian ateston ankaŭ en la broŝuro de la akuzantaro.



**Demadanto:** Kio estas via nuna stato 5 jarojn post la nuklea akcidento?

**Tarukaŭa:** La radioaktivaĵoj falis ankaŭ en tiu ĉi regiono Nakadoori (meza parto de la gubernio Fukuŝima) for de la nuklea centralo n-ro 1. Rizkampoj, legomkampoj, montoj, vinilaj forcejoj, ĉiuj estis poluitaj, sekve ni perdis nian profesion. TEPCO nek pagis kompensan monon por niaj propretoj, nek forprenis la radioaktivaĵojn el la kampoj. Nur

pasis 5 jaroj. Mi ĉiam demandas min, kio mi estas, nur suferanta pro la damaĝoj.

Kiel kompenson por nia doloro, mi ricevis 80000 enojn (800 eŭrojn) en 2011 kaj 40000 enojn en 2012. Tio estas la tuto. Ĉu ni povas esti silentaj per tiuj 120000 enoj? Ĉu ni povas atendi ĝis radioaktiveco malmultiĝos? Tute ne! Nia perdo estas multege pli granda ol tiu sumo.

**Demadanto:** Mia aŭdas, ke via forpasinta patro okupiĝis tre diligente pri organika agrikulturo de legomoj.

**Tarukaŭa:** Li havis tre fortan intereson pri la medio. Li komencis kultivi brasikojn vintre, ĉar vintre oni ne bezonas insektmortigilon. Brasikoj kreskis bone sub neĝo kaj iĝis dolĉaj. Ĉiuj lokaj lernejoj uzis niajn brasikojn por lunĉo. Mia patro estis tre feliĉa, ke li povos doni tre sekuran manĝaĵon al la lernantoj. Iam li eĉ prelegis pri organika agrikulturo en lernejo. Li estis fiero pro siaj legomoj.

Venis de la ŝtato instrukcio pri malpermeso de surmerkato de legomoj el nia distrikto, kaj en la sekvanta mateno li mortigis sin. 7500 brasikoj estis pretaj por surmerkato, sed ĉiuj fariĝis rubaĵoj. Certe li fariĝis tro nervozaj, pensante pri sia malluma estonteco.

\* En la broŝuro de la akuzantoj li skribis jene:

La 12an de marto 2011, mia patro, spektante la eksplodon de la nuklea reaktoro n-ro 1 en televido, diris: “La afero okazis laŭ mia antaŭsupozo. Tio, kion homoj faras, nepre rompiĝas. Kial Japanio, kiu suferis/as pro la atombomboj, faris nukleajn reaktorojn? Kiel stulta estas Japanio!” En 1988 li partoprenis en la kontraŭatombomba manifestacio en Hiroŝimo kaj havis grandan intereson pri danĝero de nukleaj centraloj. Mi estis surprizita, ke la afero okazis laŭ la antaŭsupozo de mia patro.

Post la akcidento mia patro fariĝis pli kaj pli silenta kaj poste ekvomis. Kiam estis malpermesite surmerkati legomojn, li diradis: “Legomindustrio de Fukuŝima finiĝis. Terkulturistoj de Fukuŝima ne plu povas vivteni sin”.

Vespere la 23an de marto venis per fakso anonco pri malpermeso de surmerkato de legomoj. En la sekvanta mateno li estis trovita morta sub la arbo malantaŭ la domo. En la poŝo estis paŝadmezurilo, kaj ĝi montris, ke li paŝis 700 paŝojn. Eble li rigardis la brasikajn kampojn, kiujn li longe prizorgis.

Tuj post la tertremo li komencis ripari la magazenon. Se ne okazintus la nuklea akcidento, li povintus restariĝi. Mi ne povas esprimi mian senton, kiam mi faligis lin de la arbo.

Marto estis la sezono por rikolti brasikojn. En la kampoj kreskis 7500 brasikoj. Ni ne povis rikolti ilin, do ili kreskis tro kaj mi foje aŭdis “br” el fendiĝantaj brasikoj. Tiu sono estis krio de forĵetitaj brasikoj.

**Demandanto:** Pri tiu afero, en la juĝejo TEPCO aprobis la rilaton inter lia morto kaj la akcidento, kaj okazis kompromiso, ĉu ne?

**Tarukaŭa:** Por venĝi mian patron, mi akuzis TEPCO-n, kaj fine mi gajnis kompromison kaj ricevis kompensan monon. Mi antaŭvidis, ke la respondeculo de TEPCO venos al mia hejmo por preĝi por mia patro kaj petos pardonon, sed mi miskomprenis. Venis al mi nur faksa mesaĝo.

**Demandanto:** Ĉu oni purigis la teron?

**Tarukaŭa:** Oni “purigis” la rizkampojn. Oni fosis la teron 40 centimetrojn profunde, disĵetis zeoliton, kaj miksis la teron. Oni diras, ke zeolito absorbas radioaktivaĵojn. Tio estis tiel nomata “senpoluigo”.

Tamen ridinde, ĉu ne? Povos esti, ke rizplantoj ne ensuĉos radioaktivaĵojn, sed la kvanto de radioaktivaĵoj estas sama. Ni terkulturistoj

laboras de mateno ĝis vespero sur tiu poluita tero. Kio okazos al nia korpo? Ni estas ĉiam tre maltrankvilaj.

**Demandanto:** Ĉu oni ne povas deskrapi poluitan surfacan teron?

**Tarukaŭa:** Estas facile deskrapi surfacan teron, sed se oni faros tion, ne kreskos bonaj rizplantoj kaj legomoj. Por igi surfacan teron fekunda, oni bezonas kelkdek jarojn.

Mi estas la oka generacio de mia familio. Mi ne volas detrui miajn kampojn, do mi persiste laboras. Se mi ne laborus, tiuj kampoj tuj fariĝus sterilaj. Herboj kreskus kaj ĝenus la najbarojn. Ni ne povus ricevi kompenson, nek enspezon, do ni ne povus vivteni.

**Demandanto:** Kiom TEPCO kompensas por terproduktaĵoj?

**Tarukaŭa:** Se ni povas atesti perdon, ĝi pagas. Ekzemple, se iu produktaĵo, kiu vendiĝis kontraŭ 2000 enoj antaŭ la akcidento, nun vendiĝas nur kontraŭ 1500 enoj, TEPCO pagas tiun diferencon, nome 500 enojn. Dum la pasintaj du jaroj, kukumoj vendiĝis pli koste ol antaŭe pro malbona vetero. En tiu kazo TEPCO ne pagas kompensan monon, tamen vi pensu, se ne okazintus la akcidento, mi povus vendi la kukumojn pli altpreze, kaj eĉ tiu prezo estas malpli alta ol tiuj produktitaj en aliaj gubernioj. TEPCO ĉiam provas eviti pagon de kompensa mono.

Ni volus postuli kompensan monon pri multaj aliaj produktaĵoj, ekzemple en mia ĝardeno ni kultivis fungojn, ni kolektis herbojn en la monteto. Ni perdis ĉion, sed TEPCO ne pagas kompensan monon por tiuj produktaĵoj.

**Demandanto:** Kio estas malbona famo de Fukuŝima?

**Tarukaŭa:** Rizo rikoltita en 2011 estis poluita je 30 bekereroj. La normo estis 500 bekereroj (ekde 2012, 100 bekereroj), do mia rizo estis sufiĉe sekura. Sed rizo eniras en nian korpon, do ankaŭ mi ne volis manĝi mian rizon, sed mi manĝis, ĉar mi ne volis aĉeti rizon el vendejo.

Sed mi sentis kulpon pri ĝia surmerkato. Mi bone komprenas, ke homoj en Tokio ne volas manĝi rizon el Fukuŝima. Ĉu homoj volas manĝi rizon produktitan najbare de tiu malnova nuklea centralo? Tio ne estas misfamo. Se rizo ne vendiĝus pro malvera onidiro, tio estus misfamo, sed en Fukuŝima en efektiveco radioaktivaĵoj falis.

**Demandanto:** Ĉu ankoraŭ via rizo estas poluita?

**Tarukaŭa:** Kaj en 2014 kaj 2013 oni ne detektis radioaktivecon el mia rizo. Mi faris ĉion, kion mi povis fari. Mi disĵetis kaliajn kloridon por ke la rizo ne ensuĉu radioaktivaĵojn. Oni ekzamenas ĉiujn sakojn da rizo. Se la rizo estas poluita, ni ne povas surmerkatigi ĝin. Mi opinias, ke rizo de Fukuŝima estas plej sekura en Japanio.

Fakte rizo de Fukuŝima bone vendiĝas por rapidservaj restoracioj, hospitaloj ktp, sen la nomo de Fukuŝima. Rizo de Fukuŝima estas tre bongusta, do ĝi taŭgas por tiuj restoracioj, ĉar oni povas aĉeti malmultekoste tiun bongustan rizon



**Foto:** rizplantidoj vartitaj en vinila forcejo

**Demandanto:** Kiel estas legomoj?

**Tarukaŭa:** Tero en la vinilaj forcejoj ne estis poluita, do mi decidis kultivi legomojn nur en la forcejoj, rezigninte fari tion ekstere. Mi jam ne kultivas brasikojn. Nun mi kultivas brokolojn,

tamen la prezo estas malalta pro la nomo de Fukuŝima.

**Demandanto:** Jam kelkaj nukleaj centraloj komencis funkcii.

**Tarukaŭa:** Dum la pasintaj kelkaj jaroj neniu reaktoro funkciis en Japanio, sed neniam estis senluma nokto. Ni havis sufiĉan elektron. Dume oni devis pagi multe por petrolo, aŭ la kosto de brulaĵoj de nuklea reaktoro povas esti malmultekosta, sed kiam okazos akcidento, kiom oni devos pagi? Grandega ŝarĝo por ni. Se okazos alia severa akcidento, kio okazos al Japanio?

**Demandanto:** Kion vi volas diri plu?

**Tarukaŭa:** Se mi estus silenta, tio estus pli facila. Sed mi aperis en ĵurnaloj kaj televido rilate al la morto de mia patro. Certe troviĝas multaj terkulturistoj, kiuj havas malkontenton kaj koleron kontraŭ TEPCO. Mi ne povas esti silenta. Se mi ne eldirus tiun senton, mi fariĝus ruzulo.

Tial mi aperis en la filmo “Mi heredas la teron”. Mi precipe volas, ke terkulturistoj ĉirkaŭ la nukleaj centraloj en Japanio spektu la filmon. Ili sciu,

kion kaŭzos al ili nukleaj akcidentoj. Mia patro ofte diris: “Tio, kion faras homoj, nepre rompiĝos. Homoj ne povas venki la naturon” kaj li estis prava. Kaj 5 jarojn poste neniu prenas sur sin respondecon de la nuklea akcidento.

(Fino de la intervjuo)

En la broŝuro de la akuzantoj li finis sian ateston jene:

Por ni terkulturistoj la tero kaj la bona medio estas la plej valora krom nia vivo. Ni volas, ke TEPCO kaj la registaro redonu al ni la puran medion. Kiel mia patro diris, nukleaj centraloj devas esti forĵetitaj. Ankaŭ mi samon deziras.